Horizon-TAAL

ESPERANTO IN VLAANDEREN



Jaargang 46 – nummer 270 november-december 2014

www.esperanto.be

Met steun van het Vlaamse Gewest



Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w.,
46ste jaargang
Verschijnt de 1ste van elke oneven maand.
Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd

Redactie en administratie:
Vlaamse Esperantobond v.z.w.
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
tel.: 03 234 34 00 fax: 03 233 54 33
Epost: horizon.taal#esperanto.be
Webstek: http://www.esperanto.be/fel/nl

Abonnementen: 25,00 EURO

Rekeningen:
t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen:
KBC: IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB en
post: IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC BPOTBEB1

Redactie:
Pieter Jan Doumen, opmaak tijdschrift Jakvo Schram

Medewerkers:
Lode Van de Velde, Petro De Smedt, Ivo Durwael, Agnes Geelen, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, André Ruysschaert, Emiel Van Damme, Kris Panis, e.a.

Verantwoordelijke uitgever:
Pieter Jan Doumen, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Advertentietarieven: (alle prijzen zijn in euro)

* Inlassing van 3x - 6x dezelfde advertentie van een door u drukklaar geleverd exemplaar

	1-malig	3-malig*	6-malig*
formaat 1/1:	257	625	1000
formaat 1/2:	150	375	600
formaat 1/3:	110	275	440
formaat 1/4:	80	200	320
formaat 1/6:	55	140	220
formaat 1/12:	30	75	120

Op deze tarieven geldt het BTW -tarief van 21%
Kleurtoeslag bedraagt € 125 per kleur en per inlassing

TEN GELEIDE...

Geachte Lezers en Lezeressen,

In dit 270-ste nummer van Horizon.taal vindt u een oproep om lid te worden van de UEA, een wereldwijde vereniging van esperantisten, een vereniging die voor alle mensen openstaat, welke ook hun ras, nationaliteit, godsdienst of ideologie is, maar die zich verbonden voelen door eenzelfde ideaal: alle mensen zijn gelijk en alle volkeren hebben recht op een gelijke en rechtvaardige behandeling. Esperanto streeft naar een verbetering van de relaties onder alle mensen en volkeren, in de eerste plaats door een vrij eenvoudige, gemeenschappelijke taal, die het mogelijk maakt op gelijke voet te spreken met mensen van alle landen.

Als u Esperanto hebt geleerd, maar (nog) geen lid bent van de UEA, wil ik u erop wijzen dat u als individu alleen nauwelijks impact hebt op het wereldgebeuren en dat uw taalkennis van weinig nut is. Een wereldwijde vereniging heeft invloed. Hoe meer leden zij heeft, hoe groter haar invloed is en hoe krachtiger haar stem in de wereld klinkt. Het is zoals met de macht van de vakbonden: samen sterk! – al strijden wij, esperantisten, voor een ander doel.

Daarom wil ik hiermee een oproep doen aan al diegenen die Esperanto hebben geleerd, om niet langs de kant te blijven staan, maar lid te worden van de UEA, opdat zij naar behoren haar taak kan vervullen.

Pieter Jan Doumen,
hoofdredacteur

INHOUD

Ten geleide.....	3
Is het Engels een nieuw Esperanto (vervolg en slot)	4
La 26-a de julio estas la internacia Esperanto-festtago	5
Vreugde, maar ook woede na neen aan het Frans	6-7
Duits op de laatste plaats?	7-8
Nieuwe woorden in het Engels	8
La ombro de Léon Bérard ankoraŭ ĉiam ŝvebas super la ministerio de la nacia edukado	8-9
Centa UK de Esperanto en Lillo (Francio)	9
Lillo, urbo de la centa U.K. de Esperanto	9-10
Volk zonder taal	10-11-12
Word lid van de UEA!	12
Doe een gift aan FEL van 50 €, die je maar 12,50 € kost	13
Reaktualigo de *L' Esperanto au présent*	13
Verslag van de algemene vergadering van de Vlaamse Esperantobond (van 20 september 2014 van 14 tot 16 uur)	14-15-16
Ĉina kompanio serĉas esperantiston kiel kunlaboranton	16
La rezolucio de Montevideo 60-jara!	17
De droom van een Esperantostaat	18
La Erikejo festas kunveno	18
Clubprogramma's	19

Is het Engels een nieuw Esperanto? (vervolg en slot)

Hoewel enkele jaren geleden nog totaal onbestaand, is dit soort bewustwording van de eigen identiteit en taal in opgang in vroegere Britse kolonies. In India is de Engelse taal het voornaamste doelwit geworden van de nationalisten, die het totaal willen bannen uit India. Enkele jaren geleden beloofde M. Mulayam Singh Yada, de toenmalige defensieminister, dat hij en zijn medestanders niet zouden rusten vooraleer het Engels in hun land volledig geëlimineerd zou zijn. Op 15 mei 2000 publiceerde het Amerikaanse magazine "Newsweek" een artikel over de beslissing van de autoriteiten van de staat Bengalen om het Engels te devalueren tot een niet-officiële taal voor alle regeringsrapporten.

Op de Taiwanese conferentie wees iemand naar het Engels als een soort instrument tot modernisatie en economische vooruitgang. Ik reageerde hierop onmiddellijk met de vraag aan het publiek om een steekproef te nemen in de buurlanden op hun kennis van het Engels. «Wie denkt u,» vroeg ik, «scoort volgens u het best op Engelse testen in Zuidoost-Azië?» Natuurlijk staan de Filippijnen , wat dat betreft, ver boven de rest op dit gebied. Toch zijn de Filippijnen op economisch gebied een hopeloos geval. Nog zo'n stereotiep beeld dat we gemakkelijk kunnen ontkrachten.

Wij hebben ook af te rekenen met die andere waangedachte, die mensen die het Engels als tweede taal leren, doet denken dat ook zij, dankzij de nieuw verworven kennis van het Engels, de internationale organisaties zullen kunnen leiden in de geglobaliseerde nieuwe wereldorde. De waarheid is dat geen enkele internationale organisatie die het Engels als voertaal gebruikt, niet zonder controle door 'native English speakers' goed kan functioneren. Dat kan gemakkelijk geverifieerd worden, of het nu politieke, economische dan wel wetenschappelijke zaken betreft.

Het overwicht van het Frans in de 18e eeuw hielp Napoleons troepen een aantal landen te veroveren. Door het Frans kwam een gestage stroom op gang van enthousiaste medewerkers van de Franse heersers, die Napoleon over Europa verspreidde. Het was in die tijd de enige vreemde taal die Oostenrijkers, Britten, Pruisen en Russen deelden en vloeiend spraken op bijna moedertaalniveau, een situatie die nu te vergelijken is met het pidgin in Zuidoost-Azië, dat 'International English' wordt genoemd. De nederlaag en verdwijning van het Franse keizerrijk luidde de neergang van het Frans in Europa in. Het grootste deel van de Europese elite werd zich destijds in het Frans politiek bewust en begon zich ook in het Frans te ontdoen van de ketens van het Franse imperium.

Het Engels is voor de geest wat fastfood is voor de maag. Het voldoet aan de basisbehoeften, maar leidt niet tot kritisch denken. Het is, hoe dan ook, zeer duidelijk dat de verspreiding van het Engels hand in hand gaat met het economische en politieke overwicht van de Verenigde Staten, de zogenaamde 'globalisatie'. Het is nu eenmaal een wet dat de sterkste cultuur de overhand krijgt.

Het geloof dat het Engels een neutrale taal is die kan helpen bij de internationale communicatie, is slechts een wensdenken. Zij die zich verzetten tegen de Amerikaanse internationale politiek, beseffen vaak niet dat ze hun tegenstrevers reeds ernstige economische schade kunnen toebrengen door het Engels in hun eigen land te verbieden. Voor zijn internationale handel is Irak onder Saddam Hoessein overgeschakeld naar de euro en een handvol andere munten om zijn onafhankelijkheid van de dollar te verminderen, maar het heeft het Engels als tweede taal niet aangetast.

Eender welke leerling die eerst door de in het Engels gevoerde Amerikaanse propaganda werd beïnvloed en die daarna in de realiteit ontwaakt, zou een geheel andere wereld ontdekken. In plaats van een Amerikaanse supermacht zou hij een failliet land zien, dat op een steeds maar groeiende schuldenberg neerkijkt. In plaats van een wetenschappelijke supermacht zou hij ingenieurs en onderzoekers vinden, van wie het niveau in wiskunde en basiswetenschappen niet te vergelijken is met dat van een kandidaat voor een wetenschappelijke graad in het hedendaagse Japan.

" *Setting up the Monopoly of Knowledge* "

In mijn boek *Setting up the Monopoly of Knowledge* leverde ik onomstotelijke bewijzen voor het feit dat het wijdverspreide gebruik van het Engels op wetenschappelijk en technologisch gebied in landen waar het Engels niet de nationale taal is, resulteert in het plagiëren door Engelssprekende naties, in het bijzonder door de VS, van de beste wetenschappelijke verwezenlijkingen. Het Engels stelt Engelstalige landen zo in staat de geschiedenis van wetenschappelijke ontwikkelingen in zekere mate te herschrijven door de belangrijkste ontdekkingen en uitvindingen toe te schrijven aan 'native English speakers'. Om redenen die ik in dit boek nader toelichtte, dreigt ook de creativiteit in die landen op te drogen, en blijft het onderzoek beperkt tot die grenzen die meestal in de VS bepaald worden, waardoor niet-Amerikaanse onderzoekers niet aan bod komen.

Charles durand

La 26-a de julio estas la internacia Esperanto-festtago

La 26-an de julio 1887 aperis en la rusa la Unua Libro de D-ro L.L. Zamenhof pri la internacia lingvo Esperanto, kiu celas esti uzata nur por rilatoj inter homoj kiuj parolas malsamajn lingvojn. La neŭtrala lingvo Esperanto metas ĝiajn parolantojn sur la saman nivelon, tiel ke dum la interkomunikado neniu devas senti sin en malsupera pozicio. Tial Esperanto estas la sola vere justa solvo de la tutmonda lingvoproblemo.

Tial ni sugestas al ĉiuj Esperanto-parolantoj adopti kaj festi la 26-an de julio kiel internacia tago de la justa interkomunikado kaj sekve de justaj rilatoj inter etnoj, popoloj kaj kulturoj.

Justa interkomunikado estas situacio de komunikado inter homoj, en kiu ĉiuj havas la samajn rajtojn. Estas klare ke, se kelkaj homoj rajtas paroli en sia denaska lingvo, dum aliaj devas paroli fremdan lingvon, kiun ili plejofte ne bone regas, ne ekzistas tiu situacio de egaleco.

Per la elekto de unu aŭ pluraj naciaj lingvoj super la aliaj oni signalas la pli grandan gravecon de tiuj personoj, por kiuj la uzataj lingvoj estas iliaj gepatraj lingvoj. Tiu elekto fariĝas rimedo por ekskludi homojn de politiko, edukado, aliro al komercado kaj multaj aliaj aspektoj de la vivo. Ĝi fortigas la sociajn-ekonomiajn malegalecojn inter grupoj.

Ekzistas lingvaj rajtoj de la homoj, kaj ekzistas homaj rajtoj pri la lingvoj. Libereco de sinesprimado kaj uzado de iu lingvo estas nedisigeblaj. Spertoj en la tuta mondo montras, ke politiko de plurlingveco povas pliampleksigi ŝancojn por homoj en multaj manieroj. Sed tio, kion egaleca mondo bezonas, estas trilingva formulo, cetere rekomendita de Unesko, kiu donas publikan rekonon al la uzado de tri lingvoj : la gepatra, la landa aŭ regiona kaj internacia.

Gepatra lingvo. La homoj deziras kaj bezonas povi uzi sian gepatran lingvon, eĉ kiam tiu ĉi estas nek la landa aŭ regiona nek internacia lingvo.

Unu landa aŭ regiona lingvo. Lingvo de loka ligado faciligas la komunikadon inter malsamaj lingvogrupoj en lando aŭ regiono.

Unu internacia lingvo. En tiu ĉi epoko de tutmondiĝo, ĉiuj homoj devus esti kapablaj paroli neŭtralan internacian lingvon, kiu metas ĉiujn popolojn sur la saman nivelon, kiam temas pri internacia komunikado.

La landoj bezonas rekoni ĉiujn tri kiel oficialajn lingvojn aŭ almenaŭ rekoni iliajn uzadon kaj instruadon. Ekzistas multaj versioj de tiuj trilingvaj formuloj, depende de la lando. Dum estas eble kaj eĉ dezirinde, ke ŝtato restu 'neŭtrala' pri etneco kaj religio, tio ĉi ne estas ebla por lingvoj. La homoj en la mondo kaj la civitanaro en la unuopaj landoj bezonas komunan lingvon por antaŭenigi reciprokan interkompreniĝon kaj efikan komunikadon, sed samtempe rajtas utiligi sian gepatran lingvon.

La internacia lingvo Esperanto ofertas ilon neŭtralan por certigi la lingvajn homajn rajtojn je internacia nivelo. «El ĉiuj planlingvoj de la mondo Esperanto estas hodiaŭ la plej konata kaj la plej uzata. Laŭ mi ĝi alportos multajn avantaĝojn, se la homoj konsideros ĝin serioze... Esperanto bezonas malpli da lernotempo ol iu ajn 'natura' lingvo, ĉar ĝi estas regula kaj logika – ne havas esceptojn. Tamen, oni povas en Esperanto diri ĉion, kion oni volas, ĉar ĉiu povas facile krei novajn vortojn», laŭ la monde konata lingvistino D-ro Tove Skutnabb-Kangas. Ĝi, krome, malhelpas la hegemoniismon de la momente grandaj potencoj. Tiuj potencoj nuntempe estas la anglalingvaj landoj, kaj tial la angla iĝis tiel potenca tra la mondo. Sed kia estos la estonteco, post 50 jaroj? «Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiuj lingvoj estas afero al kiu Esperanto signife kontribuas,» laŭ alia konata lingvisto, Robert Phillipson.

Estas tempo ĉesi sekvi la momentajn fortulojn, ni devas komenci starigi situacion de egaleco inter ĉiuj popoloj de la mondo. Esperanto estas ilo por atingi justan komunikadon.

Brian Barker

D-ro Tove Skutnabb-Kangas



Vreugde, maar ook woede na neen aan het Frans

Sankt-Gallen. Als eerste kanton heeft Thurgau het vak Frans in de lagere school afgeschaft. In verscheidene kantons staan soortgelijke beslissingen op het getouw. «Nu worden wij uitgedaagd om te beletten dat een lichte afwijking het hele systeem uit zijn evenwicht brengt,» zegt Christoph Eymann, voorzitter van de Conferentie der Schooldirecteurs (EDK). "Met de mededeling van die beslissing zendt het kanton Thurgau een slecht signaal uit in Zwitserland," zegt ook de hoge regeringsambtenaar van het kanton en voorzitter van het onderwijsdepartement Stefan Kölliker. «Als de kantons de wettelijke talenstrategie in Duitstalig Zwitserland niet voortzetten, dreigt er een ingreep van de federale overheid.»

In het kanton Sankt-Gallen zijn er wensen geuit die als doel hebben het Frans helemaal van de lagere school naar de middelbare te verschuiven. Dat kan echter alleen maar gebeuren door het opzeggen van het onderwijsconcordaat. Met een motie wil de partij SVP dit in november, volgens kantonraadslid Sandro Wasserfallen, bereiken. «Ik verheug mij over de beslissing van Thurgau, en ik hoop op een signaalwerking,» zegt hij. De beslissing van Grote Raad van Thurgau maakt Nathalie Meiner-Schneider, voorzitster van de leraressenconferentie van de kantonnale gymnasia van Sankt-Gallen, woedend. «De afvoering van een vreemde taal zou alleen maar in uitzonderingsgevallen mogen gebeuren. En dat zou zowel voor het Engels als het Frans moeten gelden.»

Het kantonnale leraars- en lerarenssenverbond van Sankt-Gallen noemt de beslissing van Thurgau voorbarig. Een gemeenschappelijke oplossing vinden voor alle Duitstalige Zwitserse kantons zou wenselijk zijn. *(Ostschweiz)*

Nadat het Frans in de lagere scholen van Thurgau werd afgeschaft, wil de opvoedingsdirectrice Monika Knill de nationale talenstrategie flexibiliseren.

Vraag: *Mevrouw Knill, Thurgau is het eerste kanton dat het vak Frans in de lagere scholen afvoert. Krijgt u nu problemen met uw collega's in de andere kantons?*

Antwoord: Ikzelf krijg geen problemen. Maar die beslissing is vanuit het standpunt van de nationale talenstrategie een stap achteruit. Dat kan men niet goedpraten. Tegelijk moeten wij de Grote Raad op zijn plicht wijzen: de jongeren zouden na het negende schooljaar even goed of beter Frans moeten spreken dan vandaag, omdat zij die taal in het secundair onderwijs intensiever moeten leren.

Vraag: *Doorslaggevend zou dan zijn wat de jongeren uiteindelijk kennen en niet wanneer zij de taal beginnen te leren. Kan daarvoor een meerderheid gevonden worden?*

Antwoord: Het zal erop aankomen wat in de andere kantons gebeurt. Als nog andere kantons autonoom de tweede vreemde taal naar de middelbare scholen verschuiven, verhoogt dat de druk om een flexibele oplossing te vinden.

Vraag: *Hoopt u dat nog andere kantons het Frans op de lagere scholen afschaffen?*

Antwoord: Neen. Maar ook de conferentie van de directeurs heeft ter kennis genomen dat in nog andere kantons stappen in die richting worden genomen. Algemeen moet men zich de vraag stellen hoe men een harmonisatie van het talenonderricht kan realiseren. Aan de grondstelling mag niet geraakt worden: op het einde van het negende schooljaar moeten onze leerlingen het Frans in hun broekzak hebben.

Vraag: *Gaat u op de conferentie van de directeurs aansturen op een flexibilisatie van het vreemdetalenconcept?*

Antwoord: Ja, heel zeker. Het gaat erom om aan Franstalig Zwitserland te tonen dat ook zonder Frans op de lagere scholen de leerlingen van Thurgau op het einde van de negende klas minstens even goed Frans kennen als vandaag.

Vraag: *Tijdens een debat in de Grote Raad werd er gezegd dat een derde van de leerlingen na de eerste klas van het secundair Frans wegkiest. Is dat zo?*

Antwoord: De details van de voorschriften inzake verplichte en vrije vakken zijn mij minder bekend, maar leerlingen van het secundair onderwijs kunnen vanaf het tweede leerjaar Frans door een ander vak vervangen.

Vraag: *De afschaffing van het Frans op de lagere scholen gaat dus als gevolg hebben dat er in het secundair meer uren Frans gegeven zullen worden?*

Antwoord: Ik kan u enkel zeggen dat het aantal uren Frans in het secundair verhoogd zal worden. Anders klopt de rekening niet.

Vraag: *Is er dan in het secundair onderwijs genoeg ruimte voor bijkomende lessen?*

Antwoord: Dat zal de grote uitdaging zijn. Wij hebben al een goed geladen uurrooster. In ieder geval valt die verandering samen met de invoering van leerplan 21. Wij zullen het uurrooster dus sowieso moeten aanpassen. Hoe wij de bijkomende uren Frans daarin onderbrengen, zal met de kantonnale aanvullingen van leerplan 21 overeengekomen moeten worden.

Vraag: *Het staat dus niet vast dat men in het secundair een ander vak moet afbouwen?*

Antwoord: Dat zou verhinderd moeten worden. Ik neem ook op de koop toe dat de verschuiving van de lagere school naar de middelbare meerkosten met zich brengt.

Vraag: *Kan het afschaffen van het Frans in de lagere school in overeenstemming gebracht worden met het Duitstalige leerplan 21, dat ook Frans voorziet op de lagere scholen?*

Antwoord: De kennis van de leerlingen die in het leerplan wordt vereist, zullen wij moeten verschuiven naar de vijfde en de zesde klas van het middelbaar. De doelkennis moet op het einde dezelfde blijven. *(Appenzellerland, 15.08.2014)*

DUITS OP DE LAATSTE PLAATS?

Het Engels wordt wereldwijd de belangrijkste taal, de lingua franca. Dat beïnvloedt ook de positie van het Duits in het onderwijs. Duits is ondertussen nog slechts zelden eerste taal. Dit thema stond in het middelpunt van de jaarvergadering 2014 van het verbond der Belgische germanisten en leraars Duits in Antwerpen. Ook een panel met een hoog gehalte met o.a. minister-president Karl-Heinz Lambertz (SP) discussieerde over heden en toekomst van het Duits in België en de wereld.



Karl-heinz lambertz

Ongeveer 50 germanisten en leraars Duits waren uit heel België naar Antwerpen gekomen om over de actuele situatie van het Duitsonderricht wereldwijd en in België van gedachten te wisselen. Gastvrouw was de Universiteit van Antwerpen. Twee experten inzake vreemdetalendidactiek en meertaligheid leidden het thema in: prof. dr. Nicole Marx van de Universiteit van Bremen en prof. dr. Rafael Berthele van de Universiteit van Freiburg (Zwitserland).

Dat het Engels als wereldwijde verkeerstaal onstuitbaar de leiding neemt, confronteert de leraars Duits in Rusland en Zuid-Amerika met nieuwe problemen: «Duits is ondertussen slechts in zeer zeldzame gevallen nog eerste vreemde taal. Vaak maken de leerlingen onverklaarbare fouten, die van eerder geleerde vreemde talen, vooral van het Engels, afkomstig zijn. Dat vereist nieuwe onderwijsmethodes, die ook veel kansen inhouden: talen staan met elkaar in verbinding en beïnvloeden elkaar. Wie eenmaal een vreemde taal heeft geleerd, leert gemakkelijker een tweede. Het toverwoord heet 'netwerkleren'. Van 'school' komt men snel op 'Schule', 'école' of 'escuela' en omgekeerd.»

Rafael Berthele toont zich sceptisch: die 'explosietheorie' – men leert een vreemde taal en plots gaat de toegang tot andere talen open – is wetenschappelijk niet bewezen. Kennis van het Engels is wel nuttig voor aanvangers van het Duits, maar op een hoger niveau speelt zij geen rol meer. En dan werpt Berthele een nieuw argument in het debat: «Moet men werkelijk altijd een taal kunnen spreken? Het volstaat misschien als men ze verstaat.» In de Zwitserse bondsregering heeft het Italiaans in vergelijking met het Frans het hard te verduren. «Maar het zou misschien helpen als de afgevaardigden het Italiaans ten minste zouden verstaan!» Dat men ook veel Belgen passieve taalkennis onder de neus kan wrijven, zegt hij niet, maar wordt wel zo verstaan door het publiek.

Bij de aansluitende podiumdiscussie over het thema *Duits op de laatste plaats?* benadrukt ambassadeur dr. Eckart Cuntz het belang van het Duits in Europa. Voor meer dan 100 miljoen mensen is het Duits de officiële taal, nl. in Duitsland, Oostenrijk, Zwitserland, Italië, Liechtenstein en België.

BGD-voorzitter dr. Achim Küpper mag aan het publiek het goede nieuws brengen dat het aantal leerlingen die Duits leren in de Vlaamse middelbare scholen, weer lichtjes is toegenomen. De vraag naar Duitsonderricht in de Zuid-Europese landen is werkelijk sprongsgewijs toegenomen is, bericht Angelika Schenk, onderwijsexperte aan het Goethe-Instituut in Brussel: «Talrijke jonge mensen willen in Duitsland gaan werken.»

Minister-president Karl-Heinz Lambertz bevestigt dat de kennis van het Duits van het grootste belang is voor mensen die carrière willen maken in de economie: Duitsland is Europa's sterkste handelsnatie. Hij heeft echter een persoonlijk probleem: «Het duurt vaak twee jaar eer ik voor mijn administratie een Duitstalige jurist heb gevonden. De academici die uit de Duitstalige Gemeenschap stammen, gaan graag naar Duitse ondernemingen.» Problemen om Duitstalige medewerkers te vinden, hebben ook diplomaten, zoals Ghislain d'Hoop, voorlopig benoemde Belgische ambassadeur in Berlijn. Een Vlaamse lerares Duits meldt duidelijk bedrukt vanuit het publiek dat zij in twee gymnasia nog slechts vijf uur Duits geeft. Veel jonge Belgen merken pas in hun beroepsleven dat zij Duits nodig hebben om vooruit te komen en nemen dan hun toevlucht tot privétaalscholen.

Een ander aspect brengt prins Ulrich von Liechtenstein, tweede scretaris van de ambassade van zijn land in Brussel, in de discussie. «Men zou in het onderricht van het Duits ook eens erop moeten wijzen dat Duitsland niet

alleen het land is van de Audi, de BMW en Siemens. De Duitse taal is cultureel van grote betekenis. Ze is mooi, precies en rijk aan facetten.» Instemmend geknik in de zaal. En dan richt hij zich tot Karl-Heinz Lambertz: «Meneer de Minister-President, ik benijd u: de Duitstalige Gemeenschap in België telt 77.000 inwoners, terwijl wij het moeten stellen met een bescheiden 37.000...» Lambertz glimlacht en knikt instemmend, het publiek gnuift.

Als besluit blijft de erkenning dat het Duits het hard heeft te verduren in België, Europa en de wereld. Dat zou kunnen veranderen als het Duits uit de schaduw van zijn bestaan als tertiaire taal bevrijd kon worden. Zou het dan voor de leerlingen niet eenvoudiger zijn eerst een grammaticaal complexe taal te leren zoals het Duits en pas nadien minder ingewikkelde talen zoals het Engels?

De theorie klopt. Maar ze zal ook in de Vlaamse en Franstalige Gemeenschappen van België, waar het Duits, indien überhaupt, sinds lang slechts nog de derde vreemde taal is, een droom blijven voor alle taalpedagogen. (*Grenzecho*, 13.04.2014)

Nieuwe woorden in het Engels

In een taal verschijnen voortdurend nieuwe woorden ten gevolge van nieuwe uitvindingen, ontdekkingen en andere nieuwe verschijnselen Zo bestaat er nu in het Engels een woord, dat door de Engelse taalhoeders aanvaard werd, voor het urenlang bekijken van tv-series, namelijk 'binge-watch', wat men in het Nederlands zou kunnen vertalen als 'comakijken'. Het woord is erin geslaagd opgenomen te worden in de gezaghebbende Oxford Dictionary.

Side-boob = Zijboezem

Er bestaat nu ook een erkend woord voor het verschijnsel dat vrouwenborsten zijwaarts uit de knappe vrouwenkleding komen piepen. Dat is dan een geval van 'side-boob', dat in het Nederlands letterlijk als 'zijboezem' vertaald zou kunnen worden. Een geliefde afkorting uit de sociale netwerken werd eveneens bekroond met een opname in de Oxford Dictionary, namelijk 'yolo', kort voor 'you only live once', men leeft maar eenmaal. *(Oxford Dictionary English)*

La ombro de Léon Bérard ankoraŭ ĉiam ŝvebas super la ministerio de la Nacia Edukado

Léon Bérard estis de 1921 ĝis 1924 ministro de tio, kion oni nomis tiam la Publika Instruado. Plurfoje ministro pri Justico en la tri registaroj de Pierre Laval (1932, 1940 kaj 1944), kiu estis kondamnita kaj mortpafita en 1945 pro ŝtatperfido, li fariĝis ambasadoro de la reĝimo de Vichy, kiu kunlaboris kun la nazioj, kaj en Vatikano de 1940 ĝis 1944. La Franca Komitato de la Nacia Liberigo deklaris lin, fine de la milito, neelektebla pro lia subteno al marŝalo Pétain, unue kondamnita al morto kaj poste dumvive malliberigita pro ŝtatperfido.

Per cirkulero de la 3-a de junio 1922 Bérard malpermesis la uzon de klasĉambroj por la Esperanto-kursoj kaj fortege premis, por ke la lingvo ne estu akceptita dum debato, kiu okazis ĉe la Ligo de la Nacioj en Novjorko sekve de propono de dekkvar nacioj, el kiuj naŭ ekster Eŭropo, 'favore al la universala instruado de Esperanto en la lernejoj kiel internacia helplingvo'. En la posta jardeko, la 17-an de majo 1935, Bernhard Rust, ministro pri scienco kaj edukado de la Tria Regno en Germanio, dekretis saman tiel motivitan malpermeson: «La flegado de artefaritaj lingvoj kiel la lingvo Esperanto ne havos lokon en la nacisocialisma ŝtato.»

La raporto publikigita la 21-an de septembro 1922 fare de la Ligo de la nacioj substrekis la konstatitajn avantaĝojn de la Esperanto-instruado en diversaj landoj. Ĝi estas legebla en la franca kaj angla. En la franca en http://vortareto.free.fr/argumentaire/sdn/sdn_index.htm kaj en la angla en https://archive.org/details/esperantoasinter00leagrich.

Hodiaŭ, dum estas vasta rekuperado de la memoro de Jean Jaurès, politika gvidanto kaj pacifisto, murdita en 1914, estas ĝeneraligita kaj flegata la nescio pri Esperanto kaj la fakto ke, en 1907, Jaurès proponis en la Kongreso de la Socialista Internacio en Stutgarto ĝian uzon por la informoj disvastigataj fare de la brusela Oficejo de la Internacio. Hodiaŭ Esperanto estas unu el la lingvoj de Labourstart, la tutmonda reto de sindikata solidareco.

La nun reganta partio en Francio pluigas la nescion de Esperanto. Granda figuro de la socialismo en norda Francio, Guy Lengagne, esprimis sian malaprobon pri tiu sinteno dum internacia renkontiĝo okazinta en 2005 en Bulonjo-ĉe-Maro, la urbo kies urbestro li estis. Li eksiĝis el SFIO (Francio Sekcio de la Laborista Internacio), kiam ĝi regis Francion kaj engaĝis ĝin en la militon de Alĝerio.

Inteligenta demando de Bruno Leroux, prezidanto de la Socialista Grupo ĉe la Nacia Asembleo, farita la 22-an de julio 2014 al la ministro pri edukado, ricevis stereotipan respondon grandparte la saman, kiun donis la antaŭaj ministroj sen distingo de politika aparteno, kaj gurdante jam de jardekoj senkonsidere de la evoluo.

Estas fine pli facile kaj pli efike marĝenigi Esperanton

sen malpermesi ĝin, kiel faris la franca ŝtato en la epoko, kiam la franca kolonia imperio estis je sia apogeo, kaj poste la nazia reĝimo.

Henri Masson

Centa UK de Esperanto en Lillo (Francio)



Escepta estos la okazo festi la centan Universalan Kongreson de Esperanto de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015 en la regiono, kie okazis la unua kongreso! En Lillo, bela ĉefurbo de norda Francio, proksima al la belga-franca limo, vi malkovros tute tipan arkitekturon, ŝatos konvenigan etoson kaj povos facile iri ĝis la proksima urbo Bulonjo-ĉe-Maro laŭ la paŝoj de D-ro L.L. Zamenhof.

La lilla kongreso oportune troviĝas proksime al la stacidomo kaj rande de la urbocentro. Tie vi ĝuos buntan, altkvalitan programon preparitan speciale por tiu elstara evento.

Francio estas monde famkonata pro siaj diversaj pejzaĝoj, sia interesa historio, sia riĉa kulturo kaj kuirarto. Dum viaj ekskursoj antaŭ, dum kaj post la kongreso vi spertos la kulturan riĉecon de la lando.

Lillo situas kerne de la triangulo Londono – Bruselo – Parizo. Ĝi troviĝas je 80 minutoj de Londono, je 36 minutoj de Bruselo, je 60 minutoj de Parizo kaj je 50 minutoj de la pariza flughaveno Roissy-CDG.

Norda Francio estas la plej juna regiono de la lando kaj unu el la plej dense loĝataj en Eŭropo. Pordo de Francio al norda Eŭropo, la regiono mirigas kaj mirindas.

Riĉa heredaĵo – Rigardante al la estonteco, Lillo tamen fiere konservas sian historion, tradiciojn kaj identecon. La urbon konkeris laŭvice la flandroj, la britoj, la nederlandanoj, la hispanoj kaj denove la francoj. Tiuj epokoj plu videblas en miriga arkitekturo kun diversaj influoj. Tiel en Lillo kunestas malnovo kaj novo. La riĉeco de la diversepokaj stiloj donas evidentan ĉarmon al la urbo.

Ĝuu en Lillo kaj en Bulonjo-ĉe-Maro la internacian amikecan etoson de tiu historia regiono Esperantuja! Tie vi trovos spurojn de la unua kongreso.

Lillo estas urbo plej agrabla. Laŭ ĝiaj stratoj vi trovos luksajn butikojn kaj butikoplenajn piedstratojn, artogaleriojn kaj multkolorajn stratbazarojn… Karbonado, potjesvleesch (potetviando), fromaĝoj kaj tradiciaj bieroj : tiujn trezorojn vi frandu en centjaraj tavernoj aŭ plej modernaj restoracioj, kie la franca kuirarto kunigas lokajn tradiciojn kaj internaciajn receptojn.

Svarma kulturo – Kulturo grave rolas en Lillo, kiu enkalkulas 20 muzeojn. Goya, Delacroix kaj Rodin briligas la Belartan Muzeon, la duan plej ampleksan muzeon en Francio, post Louvre.

En la najbara urbo Roubaix naĝejo iĝis unu el la plej belaj muzeoj en Francio. La nova muzeo Louvre-Lens malfermiĝis en 2012 sine de mineja areo kaj jam ravis centmilojn da vizitantoj.

Sincero, gastigemo, festemo kaj bonetoso plene apartenas al la nordfrancia, lilla vivo.

Kongresperantoj por Belgio : Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine, aŭ Flandra E-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.

Pli sciu pri la 100-a Universala Kongreso : www.uea.org/kongresoj - www.lille2015.fr.

Vizitu kaj ŝatu nin en Facebook ! « Lille2015» !

Laŭ la unua bulteno de UEA

Lillo, urbo de la centa U.K. de Esperanto

La nord-franca urbo Lillo, kie okazos sekvantjare la UK, estas la ĉefurbo de la franca departemento Nord kaj de la regiono Nord-Pas-de-Calais. La evento okazos en la Granda Palaco de Lillo, kiu povas akcepti 5000 partoprenantojn kaj situas en la komerca kvartalo Euralille je nur kelkaj minutoj piede de la stacidomo kaj la centro.

Lillo situas proksime de la franca-belga limo je 25 km de la belga urbo Kortrejko, kie okazos la postkongreso. Kun la regiono Kortrejko-Muskrono, Lillo en la plej larĝa senco konsistigas tre dense enloĝatan regionon kun preskaŭ du milionoj da loĝantoj.

Ekde la mezepoko Lillo estis grava industria urbo (tekstilo). Ĝi havas gravan regionan funkcion kaj universitaton kun kvar kampusoj kaj entute 110.000 studentoj.

La urbo estis fondita kun la latina nomo *Ad Insulam,* en

insulo en la rivero Deûlo, kiu estis tradukita en la malnovan francan kiel *à l'isle* (prononcu : a lil) kaj en la flandran lingvon kiel *ter ijssel* (prononcu: ter isel), kiuj donas en la moderna franca *à Lille*, kaj en la flandra *Rijsel*.

Ĉar la franca nomo multe similas al la latina vorto *lilium* (lilio), ekde 1199 oni vidas lilion sur la blazonŝildo de la urbo. La nomo Rijsel estas nuntempe uzata nur en Flandrio.

Lillo estis fondita en la 11-a jarcento de la flandra grafo Baldueno V en insulo en la rivero Deûle. Rijsel fariĝis la ĉefurbo de la suda parto de la grafejo Flandrio, kiu etendiĝis sur granda parto de nord-okcidenta Francio.

En 1297 la urbo estis konkerita de la franca armeo post akraj bataloj, dum kiuj la loĝantoj elsendis siajn porkojn por rompi la francan atakon.

Post la batalo apud Pevelenberg en 1304 Lillo fariĝis parto de Francio kun la resto de la pikarda Flandrio ĝis en 1369, kiam Filipo la Temerara, duko de Burgundio kaj grafo de Flandrio, ricevis la regionon kiel geedziĝan donacon de la franca reĝo.

En 1667 la urbo estis sieĝata kaj konkerita de la franca reĝo Ludoviko XIV. Post la Franca Revolucio de 1789 la urbo, kiu situis en la frontlinio, estis atakata de la aŭstroj, kiuj posedis la Sudajn Nederlandojn (la nunan Belgion). La sieĝo malsukcesis, kaj la franca generalo Dumouriez profitis de la okazo konkeri la Aŭstrajn Nederlandojn.

En la 19-a jarcento Lillo kaj la ĉirkaŭanta regiono spertis grandan kreskon de loĝantaro danke al la industriigo, precipe la tekstilindustrio, kiu altiris multajn enmigrantojn, precipe el Flandrio kaj Pollando.

Dum la Unua Mondmilito la urbo multe suferis pro la germanaj bombardoj. Granda parto de la urbo estis detruita de incendioj. La disfalo de la tekstilindustio ĉirkaŭ 1927 kaŭzis grandan povrecon. Kiam post 1980 nova krizo en tekstil- kaj metalindustrioj kaj la ĉeso de la karbindustrio en la departemento Nord kaŭzis enorman senlaborecon, la urbo elektis la servadindustrion. En 1962 la urbo havis ĉirkaŭ 241.000 loĝantojn. De 1962 ĝis 1982 tiu nombro malkreskis ĝis 168.000, sed ekde 2000 ĝi denove kreskas.

Lillo estas grava nodo de aŭtovojoj, akvovojoj kaj fervojoj, danke al kio la urbo jam ĉiam estis grava ekonomia centro. Nuntempe turismo ludas gravan rolon. 125 hoteloj ricevas la turistojn. En 2004 naŭ milionoj da turistoj vizitis la urbon, kaj 1,4 milionoj da turistoj tranoktis tie 2,4 milionfoje.

Vidindaĵoj: la komercĉambro kaj belfrido de la Placo Charles de Gaulle, kiu nun estas muzeo ; la neoklasika Operejo, ekuzata en 1924, kun salonego por 1000 spektantoj ; la urbodomo (hôtel de ville) kun belfrido kaj 100 metrojn alta turo de 400 ŝtupoj.

La kongreso estas unika okazo por novaj esperantistoj plibonigi sian parolkapablon de Esperanto kaj konatiĝi kun esperantistoj el la tuta mondo. (laŭ la interreto)

Volk zonder taal



Claude Piron

Welke welluidende, strikt logische en relatief gemakkelijke taal wordt door miljoenen mensen in de hele wereld gesproken en is zeker de gemakkelijkste en rechtvaardigste oplossing voor de Europese Unie met haar 24 verschillende talen? – Esperanto!

Op een avond in een aula van de Universiteit van Louvain-la-Neuve, die halfvol zit met toehoorders tussen de twee leeftijden, geeft Claude Piron, psycholoog en overtuigde esperantist, een komische, maar genadeloze uiteenzetting over de volmaakte ongeschiktheid van het Engels als internationale taal. De man, die weet waarover hij spreekt – hij was lang tolk bij de UNO en de WHOMS voor het Russisch, het Chinees, het Spaans, en het Engels – is bezig een anekdote te vertellen: "...En voor zijn voltallig aanwezige mannelijke collega's verklaart de Deense minister in het Engels, heel trots op de nieuwe internationale verantwoordelijkheid die hij op zich neemt: «*Well, I'm at the beginning of my period... !*» Hij wou zeggen: «Ik begin te werken in mijn nieuwe verantwoordelijkheid.» Maar hij zei in feite: «Ik sta aan het begin van mijn menstruatie...» Ha, die taal van Shakespeare! Niet tevreden met de massa's uitzonderingen, onregelmatigheden, valse vrienden en idiotismen (uitdrukkingen waarvan de betekenis nooit overeenkomt met de eenvoudige vertaling), zit het Engels boordevol met woorden die vreemdelingen niet onmiddellijk kunnen decoderen. «Als een Brit in een ietwat gecompliceerde zin de klank [rlajt] laat horen, alsof hij een dikke hete aardappel in de mond heeft, krijgt zijn gesprekspartner twee seconden de tijd om te begrijpen wat hij zegt: bedoelt hij *recht, rechts* of *gelijk (right)*, of bedoelt hij *licht, ritus* of *schrijven (light, rite, write)*?» Ofschoon het Engels de eerste vreemde taal is die 92% van alle leerlingen over de hele wereld leren, is zij moeilijk onder de knie te krijgen. Ondanks de geweldige inspanningen die men levert om de taal te assimileren, slaagt slechts één Europeaan op de honderd erin om op het einde van zijn studies de taal min of meer correct te spreken. Heel wat uitdrukkingen die erg op elkaar gelijken

Jen simpla sed certe ĉarma poemeto de la kroata verkisto Dragutin Domjanić (1875-1933). Jozefo Velebit tradukis ĝin en esperanton.

Figuretoj	*Figuurtjes*
Kavalir' kun damo, par' el porcelano,	*Ridder met dame, een paar uit porselein,*
hele okulumas en lasta sunflamo.	*lonkt helder in een laatste zonnegloed.*
Li hontemas iom, ŝi 'stas in' koketa,	*Hij schaamt zich lichtjes, zij is een kokette vrouw,*
Antaŭ minuto dancis en takt' minueta.	*Een minuut daarvoor dansten ze op het ritme van een menuet.*
Ili ŝajne celis por moment' ripozi,	*Ze wilden blijkbaar een poos rusten,*
Diri kion oni povas nur supozi.	*Zeggen wat men slechts kan veronderstellen.*
Li volis sin koncentri ŝajne dum ĉi halto,	*Hij wou zich blijkbaar concentreren tijdens deze pauze,*
Ŝi rigardon ĵeti al spegul' kun ardo.	*Zij vurig een blik werpen op een spiegel.*
Ĉesis sun', rezedo per arom' regalas.	*De zon scheen niet meer, een reseda geurt heerlijk.*
Kial, sed, subite la vizaĝoj palas?	*Waarom, echter, verbleken plots de aangezichten?*
Okul' ne brilas, rid' ne ĉarmas ame :	*Het oog schittert niet, de lach bekoort niet liefelijk:*
Post bosket' sin kaŝis sun' luminta varme.	*Achter een bosje heeft de zon, die warm scheen, zich verborgen.*
En mallumon sinkis parko post sunbano,	*In duisternis zonk het park na het zonnebad,*
Sen vivsigno restis par' el porcelano.	*Zonder levensteken bleef het paar van porselein.*

La titolo

Figureto estas malgranda figuro*, *figuur*
statueto, ornamaĵeto*, *kleine versiering*
prezentanta homon, beston ktp.

Verso 1. Kavalir' kun damo,...

Kio estas '**kavaliro**' ?
Laŭ PIV : 'nobelo* *edelman* distingiĝinta* *zich onderscheiden hebbende* per sia galanteco, precipe* *vooral* kiam akompananta damon aŭ sinjorinon.'
Kio estas **damo** ?
nobela* sinjorino, nobelino. *edele dame*
La vorto **'porcelana'** uziĝas ankaŭ ofte pri kiaj aĵoj*? *wat voor dingen*
pri aĵoj ege rompeblaj*, rompiĝemaj*. *breekbaar, geneigd om stuk te gaan*

NB: Ĉu la lastaj du vortoj estas sinonimoj?
***rompebla**:tia, ke ĝi povas ... esti rompita*
***rompiĝema**:tia, ke ĝi emas* ... rompiĝi.* *is geneigd*

Verso 2. hele okulumas en lasta...

Okulumi? ĵeti rigardon, eventuale amdeziran, **al iu** (PIV).
Notu bone :'okulumi' estas verbo netransitiva : oni ne povas okulumi ion aŭ iun sed jes okulumi al io aŭ iu. *(niet 'iets lonken' maar 'naar iets lonken')*
Kiel oni faras tion ?Vidu poste !
Kial liaj okuloj estas tiom **helaj** ?
Pro la rebrilo* de la sunlumo. *weerschijn*
Eble ne nur pro la lumo de la suno sed ankaŭ ĉar... (la leganto kompletigu mem !)
(li estas ege feliĉa*, ĝoja, fiera...) *gelukkig*
Kion anoncas la vortoj '**lasta sunflamo**'?
ke la afero okazas vespere (kaj ke estas bela vetero !).
En kiun direkton la kavaliro rigardas?
verŝajne okcidenten aŭ almenaŭ pli-malpli tien* (= en tiun direkton) *daarheen*
Kial la aŭtoro ne simple diras 'rigardas' anstataŭ 'okulumas' ?
La vorto 'okulumas' pli forte reliefigas* *goed doen uitkomen* la bildon de la okulo, kiu reflektas* la lumon. *weerkaatsen*

Verso 3. Li hontemas iom,...

Kial li estas iom **hontema**?
Eble ĉar li ne kutimas stari sur tia soklo aŭ eble ĉar ŝi estas tiom koketa ?
Kion ni supozu, leginte* ke ŝi estas koketa? *gelezen hebbende*
Eble pri ŝia vestaro*: *kleding*
eble ke ŝi estas bele, riĉe vestita.
Alia ebleco: kiun ŝi volas ĉarmi krom* *behalve* la publikon, la ĉeestantojn*? *aanwezigen*
ino koketa: kiel oni klarigus esperantlingve la vorton 'koketa'?
PIV.: penanta* plaĉi* *moeite doend om te bevallen*

Verso 4. Antaŭ minuto...

Kiel ni scias ke ili dancis?
Ni ne certe scias. Ĉu la imagpovo* *verbeeldingskracht* de la poeto ?

Verso 5. Ili ŝajne celis ...

Kial oni supozu tion ?
Ili ne plu moviĝas. Ĉu ili konservas dum unu sekundo la teniĝon* por la bildo? *houding*

Verso 6. Diri kion oni povas nur...

Kion oni povas nur **supozi** ?

Flustri* dolĉajn, amajn* vortojn *fluisteren;lieve*

Nome*, ke ... ili amas sin (unu la *namelijk* alian), ke ili estas feliĉaj.

Verso 7. Li volis sin koncentri ...

Imagu lian mienon*. Kial aŭ *gelaatsuitdrukking* pri kio li volis sin koncentri ? (multaj ebloj !)

Verso 8. Ŝi rigardon ĵeti...

Imagu tri kialojn* kial ŝi faras tion ! *redenen*

Ĉu eble por sin konvinki* ke ŝi ... *zich overtuigen* estas ankoraŭ plaĉa, alloga*? *aantrekkelijk*

Verso 9. Ĉesis sun', rezedo per arom' ...

Kion ni pensu pri la sinsekvo* de la *opeenvolging* impresoj: unue la vido, poste la aromo/parfumo?

Verso 10. Kial, sed, subite...

La verso komenciĝas per hakita tono. Kial ?

Pro* la efiko de surprizo. La etoso* *wegens, sfeer,* subite ŝanĝiĝas. *stemming*

Kion oni jam povas timi leginte tiun verson ?

Ke io terura* okazas ! *verschrikkelijk*

Verso 11. Okul' ne brilas...

Kial subite la verso estas en la singularo dum temas pri du personoj?

Tiu ŝanĝo igas* la tonon pli serioza, *maakt* eĉ vere drameca. Oni timas ion teruran.

Ni bone konas la literaturan artifikon (trukon, ruzaĵon*) ne antaŭanonci la kaŭzon. *list*

La statuo tamen ne kapablas ŝanĝiĝi*? *zich' veranderen*

Sen la ludo* de lumo kaj ombro *spel* la rideto verŝajne perdas sian efikon.

Verso 12. Post bosket' sin kaŝis...

La suno simple malaperis post bosketo sed la aŭtoro preferas diri ke ĝi **'sin kaŝis'**, dum tamen temas pri aĵo*. Kial? *gaat het om een ding*

Personigo* ĉiam igas* *verpersoonlijking;maakt* la tekston pli viva*. *levendiger*

Verso 13. En mallumon sinkis...

Kien* kaj kiam la parko sinkis ? *waarheen*

Kial la poeto ne simple diras ke mallumo 'invadas'* la parkon ? *binnenvallen*

'Sinki' esprimas malaperon, malsukceson, perdon, eĉ katastrofon kaj samtempe ke la priparolato* estas senpova*! *besproken;machteloos*

Verso 14. Sen vivsigno restis...

Kio estintis* antaŭe* la *waren geweest;voordien* vivsignoj ?

Okulumi, ŝajni, koketi, ... jen ĉiuj agoj* ne eblaj en ... la mallumo. *handelingen*

Ĝenerala impreso?

Jen ege simpla, tamen ĉarma poemeto.

Ĝia simpleco tute kongruas* kun la *overeenstemmen* enhavo. Povas kelkfoje esti ege agrable por la leganto, malkovri simplan kaj kortuŝan* *ontroerend* sceneton* pentritan per simplaj vortoj. *toneeltje*

Koncerne* la **stilon** de la *betreffende + accusatief* poemo, kion oni povas rimarki pri la rimoj ?

Ili estas pli-malpli regulaj, sed tamen sufiĉe por ke ili donu impreson de rima poezio.

Kaj pri la reguleco de la versoj ?

Ili havas regule 12 silaboj, escepte tamen en kiuj du versoj?

Pliaj komentoj.

Pri figuretoj.

Jen maldiskreta demando al la leganto: ĉu en via domo estas figuretoj, tiaj aŭ aliaj?

Kie aliloke* oni povas trovi tiajn? *waar elders*

figuretojn en parkoj, ĝardenoj, muzeoj, hoteloj, belaj restoracioj...

Pri kavaliro.

Kion tiu vorto montras etimologie ?

pro la latina vorto *caballus* (ĉevalo), ke temas pri iu, kiu rajdas* sur ĉevalo. *rijden*

Ekde la mezepoko* tiu vorto *middeleeuwen* uziĝas nur por... nobeloj.

Kiel iu povas esti aŭ iĝi nobelo ?

Unu ebleco estas la heredeco* de tiu *erfelijkheid* statuso. Oni naskiĝas nobelo (jen kio estas ege maljusta* por ĉiu, kiu deziras esti *onrechtvaardig* tia kaj ne rajtas)...

En iuj landoj estas alia ebleco: nobeliĝi kiel rekompenco por...

iuj servoj al la ... patrujo*. *vaderland*

Jen opinio el nia tradukvortaro:

Nobelo... promesojn disponas,

kampulo... promesojn plenumas*. *vervult*

De edelman strooit met beloften, de boer houdt beloften.

Kial iu estus inventinta* tian *zou hebben uitgevonden* kalumnion* ? *laster*

Pri damo.

Ĉe kiuj ludoj* oni uzas figuretojn *spelen* nomatajn 'damoj' ?

ĉe la kartludoj, la figuro de la ... reĝino,

ĉe la ŝakludo*, la ŝakfiguro, kiu ... *schaakspel* moviĝas kiel kuriero kaj kiel turo.

Pri paro.

La vorto **'paro'** ne ĉiam koncernas homojn, sed ankaŭ ekzemple vestaĵojn

a) por la piedoj: paro da ŝ..., da b..., da gal..., da pan..., da ŝtr ...

ŝuoj, botoj, galoŝoj, pantofloj,

ŝtrumpoj*, ŝtrumpetoj* *kousen ;sokken*

b) por la manoj: paro da gantoj* *handschoenen*

c) por la gamboj*: paro da ŝtrumpoj. *benen*

Z. iam uzis ŝercante* la esprimon : *schertsend*

Veturi sur sia paro da kruroj*. *poot*

Li volis diri... marŝi*. *stappen,lopen*

Verŝajne jenaj latinaj esprimoj inspiris lin:

*(iri) pedibus (cum gambis)**. *te voet, met de benenwagen*

ankaŭ : *(iri) pedibus apostolorum.* *gaan met de voeten van de apostelen*

Noteto pri la ĵus* uzita vorto *ŝercante*, *zoëven*

kompare al la vorto *serĉante*.

Ex.:*Serĉante** sian libron, *zoekende*

li demandis *ŝercante**kie ĝi sin kaŝis.

Kiam krome* la vorto **'paro'** uziĝas? *bovendien*

Se temas pri samspecaj* vivuloj*, *soortgelijke;levende wezens*

bestoj (paro da bovoj*, da ŝafoj*...), *koe,rund;schaap*

homoj (paro da amikoj, da geamantoj, da kanajloj*...) *schurk*

Pri okulumi kaj okuloj.

Kiam en aŭtobuso junul(in)o **okulumas** al iu alia ?

Kiam iu ne nur rigardas sed **okulumas** al iu aŭ io?

Kiam ŝi/li arde* volas observi*, *vurig;gadeslaan*

aŭ forte deziras posedi...

La legant(in)o obervu por si mem, kiam ŝi/li iam* emis* **okulumi** al iu aŭ io ! *ooit;eens geneigd was*

Kiam iu povas okulumi, kiel en la poemo, **malhele**?

Ekzemple, se ŝi/li rigardas al io aŭ iu, kiu ...

ne estas prilumita*. *belicht*

En la poemo, la prilumita paro el porcelano estas bone videbla, ĉar ĝi tuj... falas en la okulojn.

Kiel oni sukcesas okulumi sen okulfrapi* ?

eble fari kiel hipokrito? *zonder op te vallen*

Kiel oni rigardas, kiam oni 'ĵetas la okulojn' sur ion, sur iun (Z) ?

Tiam oni rigardas rapide aŭ vive*. *vief, levendig*

Kion oni faru, kiam oni ricevas sableron* en la okulo(j)n ? *zandkorreltje*

Certe ne energie froti*! *wrijven*

Male*, fermi la okulojn kaj *integendeel*

singarde froteti la palpebron*. *ooglid*

Kiam oni emas diri, ke oni preskaŭ ne povas teni la okulojn malfermitaj?

Kiam oni estas ege laca, lacega,

kiam oni batalas kontraŭ dormemon*. *slaperigheid*

aŭ kiam oni estas blindigata*. *verblind*

Kiam oni plene fidas* iun, oni povas *vertrouwen*

sekvi lin kun ok... okuloj fermitaj.

Iu, kiu ricevis de alia damaĝon*, kaj volas *schade*

sin venĝi*, diros: *zich wreken*

Okulon pro* okulo, denton pro dento !

Mi ne fidas tiun homon, mi sekvos lin ...

per la okulo !

